



# BULTENO

DE LA GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

IM SOZIALWERK DER DEUTSCHEN BUNDESBAHN

Numero 3 • Majo/Junio 1958

## Eĉ la Ministro por int. aferoj, la Generaldirektoro de la DSB, la Vicurbestro de Aarhus,

ili ĉiuj salutis la 10an fervojistan Esperantokongreson en Aarhus je la solena inaŭguro per **Esperanto**.

Estis do la plej granda sukceso, la plej bela rekompenco kaj la plej alta honoro, kiujn povis ricevi la fervojista Esperanto-movado okaze de la jubileo. Resume tio pruvas la altestimon por la internacia lingvo Esperanto de ĉiuj instancoj de la lando Danio, kaj ĝi povas esti por ĉiuj kaŭzo al pripensado, eĉ se tiu lando situas nur je la rando de la celata, unuiĝota Eŭropo.

Sed ne nur la intereso de la instancoj, ankaŭ la granda disvasteco de Esperanto en la popolo mem, precipe por ni germanoj estis surprizo. En multaj familioj estas parolata Esperanto, la nombro de la dommastrinoj Esperanton parolantaj estas eksterordinare granda, preskaŭ je ĉiu vizito al fabrikoj la karavangvidantoj parolis Esperanton kaj ĝojige ankaŭ la junularo estas multnombre reprezentata.

Cio entute — ekzemplo imitinda!

La kongreso mem ree estis granda travivaĵo por la partoprenintoj. Apenaŭ la landlimon transirinte en Padborg ili estis kore bonvenigataj per laŭparolilo stacidoma en Esperanto. La akceptejo en Aarhus modele funkciis. Post nur mallonga tempo la alvenintoj estis ricevitaj siajn hotelojn, kaj kiu havis privatan loĝejon — ne estis nemultaj el ili —, estis akceptata pleje de sia gastiganto persone.

Jam je la unua renkontiĝo, la interkonatiĝa vespero, la salono estis plenplena. Malnovajn konatulojn kaj ankaŭ novajn vizaĝojn oni povis saluti. La solena inaŭguro okazis dimanĉon en la granda salono de la Aarhusa urbdomo. Pli ol 600 partoprenantoj plenigis la feste ornamitan ejon. Krom la jam menciitaj reprezentantoj de ŝtato, fervojo kaj urbo salutis la kongreson la delegitoj el 15 landoj kaj deziris sukcesan laboradon por la aranĝo. La orkestro de la fervoja ĉefriparejo estris la muzikajn prezentadojn.

En la laborkunsidoj de la postaj tagoj la planitaj programpunktoj estis sukcese prilaboritaj. Precipe ĝojige estas la finado de la laboroj de la fakterminara komitato, kiu en plej proksima tempo aperigos la fakvortaron. En la estraro de la Federacio estiĝis malgranda ŝanĝo. La prezidanto kaj 2 membroj estis novelektataj kaj al la



eksiĝintaj prezidanto kaj kunlaborantoj estis transdonata la honora membreco pro iliaj longjaraj meritoj. Kiel posta kongresloko estis decidata la urbo Linz en Aŭstrio.

Sed kongreso devas ankaŭ fari ĝojon. Pro tio estis zorgate plej bone pri amuzo kaj refreŝiĝo. Filmprezentadoj pri Danlando, komuna rondveturado en la urbo, vizito de fabrikoj kaj de aliaj interesaj konstruaĵoj de la urbo fariĝis al tiuj, kiuj ne partoprenis la laborkunsidojn (precipe la s-inoj) tre agrablaj travivaĵoj. En solena fest-vespero kun kanto en Esperanto kaj aliaj muzikaj prezentaĵoj, el kiuj la violon-virtuozo al ĉiuj restos neforgesebla, kolektiĝis ĉiuj partoprenintoj al gaja kunrestado en la granda salono de la urbdomo. Ankaŭ la amuza vespero, kiu senescepte estis prezentata de fervojistoj, trovis ĉies aplaŭdon kaj estos al ĉiuj bela rememoro. Sambone preparita estis la ekskurso al la Nordmarbordo. Per ekstratraĵo, je kies ekveturo orkestro ludis marŝmuzikon sur la kajo, ni veturis transverse Danlandon al Ringkøbing. Ĉi tie oni iomete manĝis kaj alrigardis dancgrupon majstre prezentanta popol-dancojn en buntaj hejmkostumoj. Laŭtega aplaŭdo rekompence eksonis. Finfine per aŭtobuso la partoprenintoj alvenis en Hvide-Sand, fiŝkapta haveno kaj banloko je la marbordo. Bedaŭrinde intertempe iomete nebuliĝis kaj la vido al la vasta maro estis malbona. Tamen la impresoj al tiuj, kiuj la eterne muĝantan maron ĝis tiam ankoraŭ ne konis, estis grandioza kaj neforgesebla. Post komuna tagmanĝo en la hotelo Klutten kaj sufiĉa marŝado laŭlonge de la marbordo ni vespere je la sama maniero veturis hejmen. Kiu ĝis nun ne havis lacajn piedojn, povis plustreĉi ilin en la dancvagono de la ekstratraĵo ĝis la alveno en Aarhus.

Finiĝis la kongreso per internacia balo en la amuzejo Frihedden. Lastan fojon renkontiĝis la 376 fervojistoj el 15 landoj antaŭ la adiaŭo kun gastigintoj kaj konatoj en gaja rondo kaj travivis harmoniajn la lastajn belajn horojn. Artistaj prezentaĵoj brile lumigitaj kaj piroteknika brulaĵego estis aldonoj bonvenaj.

Nun ree pasis la belaj tagoj en internacia komunumo per internacia lingvo, dum kiuj ĉiu komprenis la alian ĉu el Barcelono aŭ Stockholmo, Parizo, Glasgovo aŭ Vieno, ĉu el Beogrado, Zuriĥo, Napolo, Londono, Amsterdamo, Kopenhago, Oslo, Helsinkio, Frankfurto aŭ eĉ el la malproksima Japanio.

## Esperanto ligis ĉiujn!

Steinig

## Atentu! Grava sciigo! Atentu!

Dum la 43a Universala Kongreso en Mainz flanke de IFEF estos aranĝata aparta fakkunveno fervojista. Ĝi okazos **merkredon la 6an de aŭgusto** je la 14a horo en la kongresejo. Daŭro proksimume 1 horon. Dum la kunveno estos prelegata grava kaj interesegega publikaĵo, verkita de prezidanto Geitmann, unu el la kvar membroj de la estraro de la Germana Federacia Fervojo. La temo estos „Raciigado — Modernigado — Aŭtomatigado ĉe la Germana Federacia Fervojo“. Ĉar ĝi estas ĝenerale interesa, ankaŭ ĉiuj nefervojistaj kongresanoj estas invitatataj kaj bonvenaj.

La saman tagon antaŭtagmeze estos vizitata (nefervojistoj ne rajtos) la en Eŭropo plej granda kaj moderna elektra centralregadejo en Frankfurt/M Hbf, delikata frandaĵo por fervojistoj ĉiuspecaj. Komuna ekveturo 7.50 h de Mainz Hbf, komuna reveturo 11.26 de Frankfurt Hbf. Helpe de tiu regadejo la tuta trafiko en kaj ĉirkaŭ Frankfurt estas dirigata. Ĉar la nombro de partoprenantoj estos limigata, ni rekomendas, jam nun skribi aŭ telefone anonci la intencon de ĉeesto al la GEFA-sekretariino, s-ino E. Kruse, Sozialamt Frankfurt/M., Basa 2204. Kompreneble ankaŭ tiaj eksterlandaj kaj germanaj gekolegoj rajtos partopreni, kiuj ne povos ĉeesti la kongreson mem, sed nur havos tempon, veni al Mainz dum unu aŭ du tagoj. Ni tamen atentigas, ke la vizitantoj de la regadejo estas petataj, nepre ĉeesti la posttagmezan fakkunsidon en Mainz. Ni provos, havigi al ni komunan liberbileton por la veturadoj inter Mainz kaj Frankfurt. Bonvolu atenti, ke GEFA nepre ne povos zorgi pri tranoktoj. Gekolegoj! Venu multnombre kaj demonstracienu la forton de nia fakmovado kaj la taŭgecon de nia lingvo sur faka tereno. Vi ne estos seniluziigataj.

La prezidanto



**Der Herr Minister des Innern,  
der Herr Generaldirektor der Dänischen Staatsbahnen,  
der Herr Vizebürgermeister der Stadt Aarhus,**

sie alle begrüßten zur festlichen Eröffnung den 10. Eisenbahner-Esperantisten-Kongreß in Aarhus in Esperanto.

Es war wohl der größte Erfolg, der schönste Lohn und die höchste Ehre, die der Eisenbahner-Esperantobewegung zu ihrem Jubiläum zuteil werden konnte. Uneingeschränkt beweist dies die Wertschätzung der internationalen Sprache Esperanto aller Instanzen des Landes Dänemark, und es sollte für uns ein Anlaß zum Nachdenken sein, auch wenn dieses Land nur am Rande des erstrebten vereinigten Europas gelegen ist.

Aber nicht nur das Interesse der Instanzen, auch die große Verbreitung von Esperanto im Volke selbst waren besonders für uns Deutsche eine Überraschung. In vielen Familien wird Esperanto gesprochen, die Zahl der Esperanto sprechenden Hausfrauen ist ungewöhnlich groß, fast bei jeder Besichtigung von Betrieben sprachen die gestellten Führer Esperanto, und erfreulicherweise ist auch die Jugend stark vertreten.

Alles in allem — zur Nachahmung empfohlen!

Der Kongreß selbst war wieder ein großes Erlebnis für die Teilnehmer. Schon an der Grenze in Padborg wurden sie bei der Einreise durch Lautsprecher in Esperanto am Bahnhof herzlich willkommen geheißen. Das Akceptejo im Bahnhof Aarhus arbeitete vorbildlich. In kürzester Zeit waren die Ankommenden in ihre Hotels eingewiesen, und wer ein Privatquartier bezog — es waren derer nicht wenige —, der wurde meist von seinem Gastgeber persönlich empfangen.

Schon beim ersten Treffen zum Kameradschaftsabend war der Saal übertoll. Alte Bekannte und auch viele neue Gesichter konnte man begrüßen. Die feierliche Eröffnung fand am Sonntag im großen Saal des Aarhuser Rathauses statt. Über 600 Teilnehmer füllten den festlich geschmückten Raum. Außer den bereits erwähnten hohen Vertretern von Staat, Eisenbahn und Stadt begrüßten den Kongreß Vertreter aus 15 Ländern und wünschten erfolgreiche Arbeit für die Veranstaltung. Das Orchester der Eisenbahn-Hauptwerkstatt meisterte die musikalische Ausgestaltung.

In den Arbeitssitzungen der folgenden Tage wurden die vorgesehenen Programmpunkte erfolgreich bearbeitet. Besonders erfreulich ist der Abschluß der Arbeiten des Fachwörter-Ausschusses, der in allernächster Zeit das Fachwörterbuch herausbringen wird. In der Leitung der Vereinigung trat eine kleine Veränderung ein. Der Präsident und 2 Mitglieder des Vorstandes wurden neu gewählt, und dem scheidenden Präsidenten wie auch den Mitarbeitern wurde für ihre langjährigen Verdienste die Ehrenmitgliedschaft verliehen.

Aber ein Kongreß soll auch Freude bringen. Darum war für Unterhaltung und Erholung ebenfalls bestens gesorgt. Filmvorführungen über Dänemark, eine gemeinsame Stadtrundfahrt, die Besichtigung von Fabriken und anderen interessanten Einrichtungen der Stadt brachten für diejenigen, die nicht an den Arbeitssitzungen teilnahmen (besonders Frauen), recht angenehme Erlebnisse. Ein Festabend mit Gesang in Esperanto und anderen musikalischen Darbietungen, von denen der Violinvirtuose allen unvergesslich bleiben dürfte, versammelte alle Teilnehmer zu fröhlichem Beisammensein im großen Saale des Stadthauses. Auch der bunte Abend, der ausschließlich von Eisenbahnern bestritten wurde, fand uneingeschränkten Beifall und wird allen eine schöne Erinnerung sein. Gut vorbereitet war gleichfalls der Ausflug nach der Nordseeküste. Im Sonderzug, der von einer Musikkapelle auf dem Bahnsteig mit flotten Weisen verabschiedet wurde, ging die Fahrt quer durch Dänemark nach Ringkøbing. Hier wurde ein Imbiß eingenommen, bei dem eine Tanzgruppe in Trachten Volkstänze meisterlich vorführte, die mit großem Applaus belohnt wurden. Im Omnibus erreichten die Teilnehmer schließlich Hvide-Sand, einen Fischereihafen und Badeort an der Meeresküste. Leider war es inzwischen etwas neblig geworden und die Sicht auf das weite Meer schlecht. Trotzdem blieb der Eindruck für die, die das ewig brausende Nordmeer noch nicht kannten, gewaltig und unvergesslich. Nach gemeinsamer Mittagstafel im Hotel Klutten und ausgedehntem Spaziergang am Meeresstrand wurde am Abend die Rückreise wieder auf dem gleichen Wege angetreten. Wer noch keine müden Füße hatte, konnte im Tanzwagen des Sonderzuges bis zur Ankunft in Aarhus weiter das Tanzbein schwingen.

Der Kongreß fand seinen Abschluß mit einem internationalen Ball im Vergnügungspark Frihedden. Noch einmal trafen sich die 376 Eisenbahner aus 15 Ländern vor dem großen Abschiednehmen mit Gastgebern und Bekannten in fröhlicher Runde und verlebten die letzten schönen Stunden miteinander. Artistische Darbietungen im Scheinwerferlicht und ein Prachtfeuerwerk waren willkommene Einlagen.

Nun sind sie wieder vorüber, die schönen Tage in internationaler Gemeinschaft durch eine internationale Sprache, wo jeder den anderen versteht, ob aus Barcelona oder Stockholm, Paris, Glasgow oder Wien, ob aus Belgrad, Zürich, Neapel, London, Amsterdam, Kopenhagen, Oslo, Helsinki, Frankfurt oder gar dem entfernten Japan.

**Esperanto verband sie alle!**

Steinig



## An alle Gefa-Mitglieder!

Im UEA-Kongreß in Mainz wird wie üblich ein „Gazetara Servo“ eingerichtet, der nicht nur die esperantosprachige, sondern auch die nationalsprachige Presse mit Nachrichten über den Kongreß versorgen wird. Es ist daher zu erwarten, daß in verschiedenen deutschen Zeitungen Artikel oder Hinweise erscheinen werden, in denen gegebenenfalls auch die Mitwirkung der Deutschen Bundesbahn erwähnt sein könnte. Wir bitten unsere Mitglieder, auf solche Artikel zu achten und sie umgehend an die Gefa-Sekretärin, BS'in Kruse, BSA Frankfurt (M.), einzusenden. Bitte nicht vergessen, Namen und Erscheinungstag der betreffenden Zeitung zu vermerken.

La prezidanto

### El la grupoj

**Mainz:** En la direkcia distrikto Mainz post tempo de stagnado nun ree montriĝas pli da vicleco inter la fervojistaj esperantistoj. Tio precipe dank' al la laboro de samideano Eisenbarth en Kaiserslautern kiu nun transprenis la taskon de subsekcio en la distrikto Mainz. Inter alia li iniciatis leterkurson por la kolegoj de nia distrikto, kiu interesas por Esperanto. Partoprenas la kurson 24 kolegoj; du leteroj estas jam prilaboritaj. Samideanino Röder kaj s-anoj Schmidt kaj Henn de la jam ĉiam tre aktiva grupo Kaiserslautern helpas je la korigado de la taskoj, same ankaŭ s-ano Ritthaler el Neustadt (Weinstr.). La lernantoj uzas la lernolibron de Brikisto. BSW pagis 50 pecojn de tiu libro por nia distrikto. La partoprenantoj de la leterkurso ricevas la lernolibron kaj la leterojn de la kurso senkoste. Sed ili pagis preskaŭ ĉiuj la kotizon je 2.- GM fariĝinte membro de GEFA. — En Speyer (Rhein) ekkreskas per la diligenta laboro de s-ano Hoffmann nova fervojista esperantista rondo. Dimanĉon la 20an de Aprilo 58 kunvenis en la instruĉambro de la stacidomo Speyer, kun s-anoj Eisenbarth, Hoffmann kaj Ritthaler priparolante la nuntempan situacion de nia afero en nia distrikto. Kompreneble ankaŭ la venonta UK okazonta en Mainz estis temo de la konversacio. Ni volas klopodi, ke plej eble multe el niaj kolegoj partoprenos la kongreson aŭ minimume la fervojistan fakkunsidon. Krome oni preparolis la planon iam okazigi en nia distrikto renkontiĝon kun francaj kaj saarlandaj kolegoj esperantistaj. Por ke la grupo Speyer havu ankaŭ eblecon praktiki Esperanton apud la lernado por la leterkurso, oni nun intencas minimume unufoje en la monato okazigi kunvenon kun ĉeesto de kursgvidanto el Neustadt (Weinstr.). Kiel ĉie ankaŭ en nia distrikto la specialaj defjorkondiĉoj ne donas sufiĉe da tempo por la necesa agado. Nun post la nova komenco ni esperas tamen, ke la membronombro kreskos en nia distrikto. La certe tre impona UK en Mainz esperble ankaŭ helpos al ni montrante al multaj kolegoj la valoron de nia lingvo.

Reinhold Ritthaler

**Essen:** En aprilo ni finis la kurson por komencantoj en Essen, kiu komenciĝis oktobro de la lasta jaro. Kolego Waldmann (Recklinghausen) bone kaj fervore gvidis la kurson, kiun komence partoprenis 10 geinteresuloj. Je la fino de la kurso li instruis ankoraŭ 6 gefidelulojn. Ni povas esti kontentaj pri la rezulto.

Okaze de la kursfino la subsekcio invitis al kunveno en la hotelo Vereinshaus Essen la 28an de aprilo. Krom la kursgvidinto ĉeestis la gepartoprenintoj de la kurso, la grupestroj, kelkaj kolegoj el la distrikto, plie kiel gastoj la prezidanto de la Esperanto-unuiĝo Essen, s-ano Klein, kaj juna jugoslava studento, kiu la antaŭan tagon jam partoprenis kunvenon de la Essena unuiĝo.

S-ano Klein faris prelegon pri la valoro kaj aplikado de Esperanto. Li akcentis, ke precipe la fervojistaj esperantistoj havas okazon, apliki Esperanton dum vojaĝoj eksterlandan, plibonigi ilian scion en la internacia lingvo pere de korespondado kun allandaj kolegoj kaj okaze de internaciaj kunvenoj de la fervojistaj esperantistoj. — La juna jugoslava studento el Zagreb, kiu ne majstris la germanan lingvon, rakontis pri sia unua vojaĝo tra Aŭstrio, kiel li havis sukceson nur per Esperanto. Li ĝojis, ke ankaŭ en Germanio li renkontis en multaj lokoj samideanojn por diskuti kun ili. — Tial la komencantoj povis ekkoni, ke Esperanto estas vivanta lingvo.

Poste oni diskutis pri la daŭrigo de la gruplaboro, kaj oni intencas aranĝi laborrondon de la fervojistaj esperantistoj en Essen.

Por la Esperanto-vivo inter la fervojistoj de la distrikto en ĉi tiu jaro ni gajnis kelkajn novajn kolegojn.

Dank' al la subteno de la Sociala Organizo en la pasinta jaro estis eble al ni, instali du malgrandajn Esperanto-bibliotekojn resp. pligrandigi la libronombro de la jam ekzistantaj Esperanto-bibliotekoj en la grupoj.

Schnetzer

**Kassel:** Naskiĝis al ges-roj Bode fileto Geeron kaj al ges-roj Koch fileto Detlev. La grupo tutekore gratulas kaj esperas, ke ili fariĝu esperantistoj denaskaj.

### Atentu!

**Feriosemajno en Wien la 25an—31an de julio**

Okazos vizito de Int. Esperantomuzeo, imperiestraj ĉambroj en Hofburg kaj Schönbrunn, trezorejoj en Hofburg, Prater kaj rondveturado tra Wien al Kahlenberg. Krome ekskursoj al Klosterneuburg (fama abatejo), Semmering (1000 m alta), urbo Wiener-Neustadt, mezepoka kastelo Kreuzenstein kaj poste al „Heuriger“.

Kostas 6 tranoktoj en 1—2 litaj ĉambroj, 6 maten-, tag- kaj vespermanĝoj, ĉiuj veturadoj kaj enirpagoj entute 75.— GM.

Pagu almenaŭ 20.— GM al Int. Esperantomuzeo Wien I, Hofburg, Aŭstrio. Inaŭguro de Zamenhofmonumento en Wien estos la 27an de julio.

Redakcio: Paul Steinig, Bremen, Ausbesserungswerk. Defjoradreso: TBOI Steinig, AW Bremen, Basa Bremen 835/348. Manuskriptojn bonvolu sendi skribitajn se eble per skribmaŝino unu kaj duonliniajn al la redakcio, tradukaĵojn kun la originala teksto. Sendilo por manuskriptoj 1, I, III., V., VII., IX., XI.

Preso: Limburger Vereinsdruckerei, Limburg/Lahn